

KOMUNIKOJ

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ
Jaro 42-a BRAZILIO, JULIO-AŬGUSTO-SEPTEMBRO 2018 2018 N-ro 171

“Amu vian Dion per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso kaj vian proksimulon kiel vin mem.”
JESUO (*Mt*, 22:37-40).

“Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro.”
KARDEC. *La Evangelio laŭ Spiritismo*.
Ĉap. 19, §7.

“Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante unu la alian, la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian.”
ZAMENHOF. *La Espero*.

Indekso

La Dankemo

– Affonso Soares (Brazilo) 1

Lorenz kaj La

Universala Kongreso 3

Kuriozaĵoj el La Leteroj
de Zamenhof 4

Kantu 4

Pri la Surat Shabd Jogo 5

Atentu la Finon

Atenção com o Fim 6

Kion Reprezentas Esperanto
por Via Vivo? 6

LA DANKEMO - Affonso Soares (Brazilo)

Dankemo estas unu el tiuj belaj sentoj, kiuj ornamas la karakteron de la noblaj animoj, ĉiam emaj reciproki ricevatajn bonfarojn per pensoj, vortoj, agoj esprimantaj sian virton.

Ĝi ofte montriĝas ĉe konkretaj, palpeblaj bonfaroj, nome tiuj, kiuj plej proksime tuŝas personajn materiajn bezonojn kaj interesojn. Sed eĉ se tiel, ĝi ne povas ne meriti laŭdon, ĉar ĝi elmontras spiritan, moralan progreson ĉe tiu, en kies koro nestas sentemo pro ricevita bono.

Dankemo ankaŭ forte elstariĝas ĝuste en la okazo, kiam vidiĝas ĝia malo, nome nedankemo. Tiam la valoro, la nobleco de dankemo estas de ĉiuj agnoskataj pro la sentoj de bedaŭro aŭ indigno, kiujn nedankemo elvokas.

Dankemo kontribuas por fortigo de amligiloj inter bonfaranto kaj protektato, kio multe helpas al ilia morala progreso, kies plej alta esprimo estas entenata en la leĝo de Amo, Justeco kaj Karitato.

Unu el la plej frapantaj ekzemploj de dankemo troviĝas en la Evangelio laŭ Luko, ĉapitro 17-a, versikloj 11 ĝis 19, pri la resanigo de dek lepruloj. Tie dankemo ankoraŭ pli reliefigas pro la kontrasto kun ĝia malo, montrita de la plimultaj roluloj.

Dek lepruloj renkontis Jesuon, kiu trairis Samarion kaj Galileon direkte al Jerusalemo. Ili de malproksime kriis al la Majstro, dirante: — “Jesuo, estro, kompatu nin!” Jesuo respondis kaj diris al ili: — “Iru, kaj montru vin al la pastroj”.

Dum la irado ili vidis, ke ili fariĝis puraj. El la dek, nur unu, kiu estis samariano, revenis kaj falis sur la vizaĝon ĉe la piedoj de Jesuo kaj dankis la Majstron. Jesuo demandis pri la ceteraj resaniĝintoj, kiuj ne revenis por doni gloron al Dio. Kaj Li diris al la samariano: — “Leviĝu kaj iru, via fido vin savis”.

Ni profitu la okazon por reliefigi komentojn de Allan Kardec, la Kodiginto de Spiritismo, pri tiu ĉi evangelia epizodo en lia verko “La genezo”, ĉapitro XV, n-ro 17:

Aldonante: “Via fido vin savis”, li vidigas, ke Dio rigardas la fundon de la koro, ne la eksteran formon de adorado. Sed ankaŭ la aliaj estis resanigitaj; necesis tio, por ke li povu doni la koncernan lecionon kaj evidentigi ilian nedankemon. Kiu tamen scias, kio al ili rezultis el tio? Kiu scias, ĉu ili estis bonfaritaj per la favoro, kiu estis donita al ili? Dirante al la samariano: “Via fido vin savis”, Jesuo komprenigas, ke ne same okazis al la aliaj.

En “La libro de la spiritoj”, de Allan Kardec, demando n-ro 937, la spiritaj revelaciintoj konsilas al homoj, trafitaj de nedankemo, ekpensi pri tiuj, kiuj faris pli da bono ol ili kaj kiuj tamen ricevis maldankon kiel pagon:

“Memoru, ke Jesuo mem estis primokata kaj malŝatata dum sia vivo, traktata kiel frenezulo kaj trompisto, kaj ne miru, ke tio sama okazas al vi. [...] Nedankemo estas provo por via persisto en bonfaro.”

Profundaj lecionoj pri dankemo kaj ties bonaj efikoj sur la homoj ĝenerale kaj sur la koncernatoj aparte ankaŭ troviĝas en la literaturo psikografie skribita de la brazila mediumo Chico Xavier (Ŝiku Ŝavier’), precipe en la verkoj de la Spirito Andreo Ludoviko, eldonitaj de Brazila Spiritisma Federacio kaj ĉiam ankoraŭ tre popularaj en brazilaj spiritistaj rondoj.

En la libro “Nia hejmo”, la unua el la kolekto “La vivo en la spirita mondo”, Andreo raportas pri bela okazo de dankemo, kies protagonistoj estas li mem kaj kelke da Spiritoj, kiuj konatiĝis kun li ankoraŭ dum la enkorpa vivo, kiam Andreo estis kuracisto.

Andreo ekscias pere de altranga Spirito, la Ministro Klarencio, apartenanta al la regantaro de la spirita kolonio Nia Hejmo, ke el la ĉirkaŭ ses mil mizeruloj, kiujn li bonfaris per senpagaj konsultoj kaj preskriboj, dek kvin ne forgesis lin, ne ĉesis pledi kaj propeti por li, kio multe helpis por plibonigo de lia stato en la spirita mondo. Klarencio memorigas lin pri tre interesa flanko de lia kuracista praktikado:



Por fini, ni transskribas, el "La evangelio laŭ spiritismo", de Allan Kardec, ĉapitro XII, n-ro 4, tiun ĉi pensigan instruon, kiu montras unu el la plej malfacilaj formoj de dankemo, inspirata de la admono de Jesuo, ke ni amu niajn malamikojn kaj preĝu por niaj persekutantoj, por ke ni estu filoj de nia Patro, kiu estas en la ĉielo:

[...] la malicaĵoj, lin [la homon] ĉiam celantaj, estas parto de provoj, kiujn li devas

"Plej ofte vi tiel laŭdinde agis el simpla ŝercemo; sed nun vi povas mem konstati, ke eĉ ŝerce la vera bono dissemas bonon sur niajn vojojn."

En ĉi tiu rilato ni povus prezenti multajn okazojn de dankemo, kiujn la bona kaj fidinda media literaturo prezentas kiel ekzemplojn por nia konduto, sed ĝin ne permesas la manko de spaco.

suferi, kaj la alta vidpunkto, el kiu li rigardas, faras la sortobatojn malpli amaraj, egale ĉu ili venas de la homoj aŭ de l' aĵoj; se li ne murmuris kontraŭ la provoj, des malpli li murmuris kontraŭ la homoj, ties instrumento; se, anstataŭ plendi, li dankas Dion pro la provo, li devas ankaŭ danki la manon, kiu donas al li okazon montri sian paciencon kaj rezignacion. Tiu ĉi pensmaniero lin nature antaŭinklinigas al pardono [...]



KUNLABORU! – Membriĝu ĉe ASOCIO LORENZ kaj helpu la disvastigon de Esperanto kaj Spiritismo en la tuta mondo!

COLABORE! – Torne-se membro da ASSOCIAÇÃO LORENZ e auxilie a divulgação do Esperanto e do Espiritismo em todo o mundo!



LORENZ

"KOMUNIKOJ"

TRIMONATA BULTENO DE LORENZ – SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

Fondita la 15-an de decembro 1975

Jaro 42-a – n-ro 171 | Julio-Aŭgusto-Septembro 2018

Interreta kaj papera senpagaj eldonoj
Ĉirkaŭ dudek mil legantoj en la tuta mondo

KONTAKTIĜU KUN NI KAJ ALIĜU:

Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz
Rua Francisco Vale, 57 Engenheiro Leal
21370-171 Rio de Janeiro-RJ – Brasil (Brazilo)
Telefonaĵoj: + 55-21-2452-9039 - + 55-21-2450-4768

Skajpo: Lorenz Editora | Fejsbuko: Editora Lorenz | Retadreso: editora_lorenz@uol.com.br
Retpaĝo: <http://editoralorenz.blogspot.com.br>



Kompostita de Rogério Mota

LORENZ KAJ LA UNIVERSALA KONGRESO

Kiel okazas ĉiujare, Eldonejo Lorenz partoprenis la 103-an Universalan Kongreson, en Lisbono, Portugalio. Ĉeestis la kunsido de Lorenz pli ol 50 personoj por aŭdi Elmir dos Santos Lima kaj João Silva dos Santos prelegi pri la temo "Reenkarniĝo".

Koran dankon al ĉiuj! Ĝis la proksima Kongreso!



Elmir prelegas.



De maldekstre dekstren:
Paul Harry Steven (Britio), Álvaro kaj
Luiz Antônio Grasso (brazilano).



De dekstre: João, Teresinha, Gonçalo Neves
kun ekzemplero de la libro "La senditoj",
tradukita de li; Álvaro kaj Joana.



La ĉeĥa paro, Viktor Dvorák kaj Libuse Dvoráková
ankaŭ ĉeestis la kunsidon de Lorenz.



Kuriozaĝoj el la leteroj de Zamenhof



Al Majnov, 1889

Estimata amiko!

Se vi volas, vi povas doni la “Renaskitan Manfred’on” por subskribo ankaŭ ne sendinte al mi antaŭe la tradukon.

La 30 kopekojn mi ricevis; ĉu mi ne skribis al vi pri la ricevo? Kredeble mi forgesis. Antaŭ kelkaj tagoj mi sendis al vi leteron por montri al via Protektoro (pri la permeso por gazeto); vi kredeble ĝin jam ricevis?

La adreso de Phillipis estas: Dr. Henry Phillips, Jr., 320 S 11 th St. Philadelphia U.S.A.

La vortojn oni devas traduki: naznaĉatj: difini, fari, decidi; matka: (anat) utero; stolko-to tiom-tiom; to jestj tio estas (t.e.)

En Ameriko kaj Aŭstralio nia lingvo havas adeptojn sed ili ĉiuj sendis al mi nur promesojn simplajn (ne senkondiĉe).

Al Drombrovski, 1889

Estimata sinjoro!

El la monatoj Majo kaj Junio la “Nomaroj” ne povos esti eldonitaj. La plej proksima numero eliros en Julio.

Kun estimo

Zamenhof

Al Majnov, 1889

Estimata amiko!

La 3 kop. por la vendita vortareto mi ricevis. En multaj el la urboj, pri kiuj mi demandis, esperantistoj jam ekzistas.

La unua serio de la adresaro estos eldonita en la fino de Julio.

La manuskripto de la vortaro internacia-rusa estas jam preta, kaj se mi ricevos la permeson eldonadi ĵurnalon, tiu vortaro tuj estos eldonita.

(Fonto: Iom Reviziita Plena Verkaro de L. L. Zamenhof. Originalaro 1. Unua etapo de Esperanto – 1878-1895. Eldonejo Ludovikito, 1989.)



KANTU

Raymundo Souza

Kantu, kantu kun mi,
mi ne volas kanti sola.
Aŭdu, aŭdu mian kanton:
ĝi parolas pri amo kaj unuiĝo
sen limoj inter la popoloj.
Kantu, kantu kun mi.
Faru ni, ke mia kanto atingu
ĉiujn, kiuj estas disaj.
La diasporo estis iu tago
de unusola popolo, sed hodiaŭ
ĝi estas de ĉiuj nacioj.
Forgesu ni niajn fieron kaj malfacilaĵon.
Ni ne estas irananoj aŭ hebreoj,
brazilanoj, rusoj aŭ afrikanoj,
ni ĉiuj estas la homaro.
Kantu, kantu ĉiuj ni unusone:
ni lasu flanke la fieron,
estu ni reale fratecaj
kaj iru ni direkte al la kompreno,
al la komuna bono kaj al la grandeco
unika, senegala, kiu estas DIO.

SENPAGAJ LIBROJ...

Ĉiuj kiuj loĝas ekster Brazilo
rajtas ricevi niajn librojn,
en Esperanto, tute senpage.
Sufiĉas nur sendi vian kompletan
nomon kaj poŝtadreson al
editora_lorenz@uol.com.br





Szilard Koczkas

Karaj geamikoj! Mi estas hungardevena esperantisto el Slovakio, Eŭropo. Mia nomo estas Koczkas Szilárd (ĉe la hungaranoj unue estas la familia nomo, prononcu: Kockáŝ Silárd, kun longa "a", por vi, Szilardo).

Bedaŭrinde mi havas kelkajn malsanojn, pro tio mi decidis tuj partopreni jogon, kiam mi trovis anoncon pri ĝi. Pri jogo mi sciis nur tiom, ke ĝi havas multe da sekcioj, specioj, kaj ĝi estas tre utila kaj por la korpo, kaj por la animo.

Mi pensis, ke ni gimnastikos, sed ne. Temas pri SURAT SHABD JOGO, kiu signifas: "Instruoj de sanktuloj", laŭvorte, "Surat", ligiĝo kun Dio, "Shabd", meditado.

Niaj lokaj gvidantoj estas Gróf Zsuzsanna (pron.: Gróf kun longa "o", Ŵujanna) kaj Fóti Pál (kun longa "o" kaj "a").

La unua leciono instruis ke 'ni ĉiuj konsistas el tri partoj: fizika korpo, animo kaj intelekto'. La jogo originas el hinduismo, Hindujo. Ĝin povas adapti eĉ ateistoj! Vi ne devas esti religiemaj, sed se tamen, jes, vi restu ĉe viaj religioj kaj vivu etikmaniere. Mi speciale kredas la universalan intelekton/racion kaj la reenkarniĝon.

Ni eklernis, ke ni ĉiam devas pensi pozitive, ni forlasu la negativajn sentojn kaj pensojn. Pensi pozitive kostas nenion, kiam la negativa pensado kaŭzas malsanojn, kaj ĉiu scias, ke la malsanoj kaj la resaniĝoj kostas multon. Ĉiujn niajn pensojn (kaj pozitivajn kaj negativajn) ni sendas en la universon, kaj ili multobliĝinte revenos. Ankaŭ pro tio estas pli utile pensi ĉiamaniere pozitive, ĉu ne?

Poste ni lernis pri la animo. Ĝiaj ecoj, proprecoj, karakteroj estas la jenaj: 1. Senlima saĝo, prudenteco, konscienco. Dio; 2. Senmorteco (la animo ne konas la morton); 3. Senkondiĉa amo (Dio tiel amas nin, kaj ankaŭ ni tiel devus ami unu la alian); 4. Ekzistado sen timo, sentimeco; 5. Universala kunaparteco, kohereco (aparteni unu al la alia) kaj 6. Beato (utilo, bono, feliĉo de la homaro).

Disvolviĝo de la punktoj:

1. Se ni ne trovas helpanton aŭ respondojn, ni trankvile demandu nian propran animon. Ĝi estas tiom saĝa, ke respondu ĉion. En ni ĉiuj estas konscienco. Certe jam ĉiu aŭdis interne, en sia memo ian voĉon, donatan konsilon, ke ni faru, aŭ male, ke ni ne faru ion, ĉu ne?
2. La animo ne konas la morton. Ĝi ne havas fizikajn gepatrojn, ĝi ekzistis kaj ciam ekzistos.
3. Tiamaniere amas nin Dio, kaj ni provu la saman! Ni ne faru kondiĉojn! Ni amu la aliulojn tiel, kiaj ili estas.
4. Nia animo estas la fonto de ĉiuj fortoj. Se ni kredas la reenkarniĝon, ke nur nia fizika korpo mortos, ke nia animo vivos plu, kial ni timu la morton? La animo vivas por eterne. Post la fizika morto, ĝi vivas plu en aliaj dimensioj, ĉiam prosperanta, evoluanta.
5. La animo estas lumo kaj amo. En la universo ĉio kuntenas, koheras, interrilatas kun ĉio, eĉ reciproke.
6. Beato. La animo en sia originala stato estas en ekstazo, ravita, sorĉita, febra kaj ĉiam, ĉie, ĉiel ĝi volas esti tia. Ĝi neniam deziras malbonon, negativaĵojn, suferojn. Ĝi por eterne volas farti feliĉa.

La estontaj temoj: La karmoj, spiritualaj regionoj, nia propra memo, reenkarniĝo, la metodo de la meditado, vegetarismo, serĉado de la flamo, la fajrero de Dieco, altruisma servado, ktp.

Paĝaroj, interesaĵoj:

- https://en.wikipedia.org/wiki/Sawan_Singh
- https://en.wikipedia.org/wiki/Kirpal_Singh
- http://gojollyusa.tripod.com/sant_darshan_singh_ji_maharaj.html
- https://en.wikipedia.org/wiki/Sant_Rajinder_Singh_Ji_Maharajsos.org
- satsang.hu
- satsang.sk

ATENTU LA FINON

Kion ajn vi faras, pri fin' atentu!
La komenco bona estas paŝ' unua
Al sukces' de l' verko; sed espero frua
Al maldiligento vin neniam tentu!

Pro malfacilaĵ' la menson ne turmentu,
La kuraĝo estas ĉiam tre influa
Kaj precipe en la laborfad' konstrua;
Ĉiam do kuraĝon al animo sentu.

Koncentradu viajn pensojn pri l' laboro,
De l' komenco al la mezo kaj la fino,
Kiel pri plej granda via ortrezoro.

Laborem' racia estas ora mino;
Ago atentema, diligent' sufiĉa
Estas vojo certa al sukces' feliĉa.

ATENÇÃO COM O FIM

Abel Gomes

De tudo que façás, atende ao fim!
O bom começo é primeiro passo
Para o êxito da obra; mas a prematura esperança
Nunca te leve à tentação para a negligência!

A dificuldade não te atormente o espírito;
A coragem exerce sempre grande influência
E tanto mais no trabalho construtivo;
Cultiva, pois, sempre o bom ânimo.

Concentra teus pensamentos no trabalho,
Do começo ao meio e do meio ao fim,
Como sendo ele sempre teu maior tesouro.

A operosidade raciocinada é mina de ouro.
Atividade atenta, dedicação bastante,
Formam o caminho seguro ao êxito feliz.

(Fonte: FEB / Reformador, Jan. 1946, p. 5)
Kunlaboris: Aymoré Vaz Pinto

KION REPREZENTAS ESPERANTO POR VIA VIVO?

La fakto, ke mi eklernis Esperanton en 1945 kaj restas ĝis nun en la movado, pruvas, ke tiu internacia lingvo — kvazaŭ granda ponto aŭ fortaj flugiloj, ebligantaj al mi vojaĝi tra la mondo kaj kunfratiĝi kun homoj de ĉiuj rasoj kaj nacioj, — signifas por mi grandan favoron de Dio.

(Ero de la intervjuo de Benedicto Silva en **Almanako Lorenz** 2017)

Mi persone ŝuldas mian unuan konscian kontakton kun la mondo de spiritaj estuloj al brazilaj esperantistoj-spiritistoj dum mia laboro en “Bona Espero” en 1977.

Do mi duoble bonvenigas la laboron de esperantistoj-spiritistoj en produktado de la belaspekta kaj interesa **Almanako Lorenz**.



Trevor Steele
(Aŭstralio)

Se la kara leganto volos ricevi la pdf-an version de ĉi-numero de Almanako Lorenz, petu kaj vi tuj ĝin ricevos.